

LA 2026-A KONGRESO DE ESPÉRANTO-FRANCE OKAZOS EN HÉROUVILLE SAINT-CLAIR!



En 1903, du jarojn antaŭ la bulonja kongreso, kuniĝis esperantistoj el Anglio kaj Francio en Le Havre. Laŭ Edmond Privat, temis pri la unua internacia ĉeesta kunveno esperantista.

En 1930 kaj en 1965, la normanda haveno bonvenigis la nacian kongreson. En 1988, ĝi okazis en Rueno.

Estis antaŭ longe... preskaŭ 40 jaroj pasis.

Nu, ni ĝojas - eĉ fieras - anonci, ke **la 2026-a kongreso de Esperanto-France okazos de la 22-a ĝis la 25-a de Majo, en nia urbo.**

La programo estas konstruata kaj baldaŭ disponeblas. Jam ni povas anonci tri gravajn prelegojn. La unua, far Vinko Markovo, temos pri Eugène Lanti, la fondinto de SAT, kiu naskiĝis en la normanda vilaĝo Néhou, la dua, fare de Tim Owen, temos pri Harold Bolingbroke Mudie, la unua prezidanto de UEA, kiu mortis kaj estas entombigita en Normandio, en Forges-les-Eaux.

La trian proponos en la franca Thomas Creusot, pri lia interese libro "Espéranto et espérantismes en France, l'utopie en pratique". Aliajn interesajn eventojn ni preparas por vi: prelegojn, kursojn, ludojn, ekskursojn, koncertojn, projekciojn de filmoj, staĝojn... Ni promesas programon riĉan, diversan kaj interesan, ĝojigan kaj amikan etoson. **En viaj agendoj, jam rezervu la datojn!**

Tiuj, kiuj ŝatus proponi kontribuojn aŭ proponi helpon povas kontakti nin per retmesaĝo: kongreso.esperanto.2026@etik.com

Bertrano



Nia klubo tagon post tago.....	2 & 3
Ĉu Donald Trump povus ricevi Nobel-premion pri paco en 2026?.....	4
Subteninda peticio.....	5
Literatura paĝo.....	6
Miljara datreveno de la fondiĝo de Caen (2/2).....	7 & 8
Komputaj paĝoj.....	9 & 10
Staĝu, kongresu.....	11
Kristnaska rakonto: kiel abio fariĝis jularbo?	12

Antaŭ 2 jaroj (vidu [Normanda Esperanto-Bulteno n-ro 290-a](#)), ni plantis ginkon en la Skvaro Esperanto en Hérouville Saint-Clair, okaze de la 40-a datreveno de la fondiĝo de nia asocio kaj de la 10-a datreveno de la inaŭguro de la skvaro.

Ĝis nun, ĝi nur aspektis kiel iu ajn arbo; nenio ligis ĝin al Esperanto. Ĉi-aŭtune, dulingva plako estis aldonita far la komunumo Hérouville Saint-Clair por klarigi, ke ĝi alvokas al tutmonda kompreniĝo per Esperanto.

"Esperanto estas neŭtrala kaj justa internacia helplingvo, kreita por faciligi komprenon inter kulturoj kaj popoloj, kiuj ne uzas la saman gepatran lingvon.

Ginko duloba famas pro tio, ke ĝi postvivis la bombadon de Hiroŝimo. Tial ĝi fariĝis universala simbolo de rezisteco, paco kaj espero".



Dimanĉon, la 7-an de Septembro.

La unuan semajnfino de septembro tradicie okazas en Hérouville la tago de la asocioj. Pro pluvego, ĝi estis nuligita pasintjare. Bonŝance, belveteris ĉi-jare kaj pli ol 80 asocioj el la urbo prezentis siajn agadojn kaj proponis demonstrojn sur la ĉefa placo de la urbocentro. Ankaŭ Hérouville-Espéranto partoprenis en la festo: kelkaj klubanoj proponis budon por konatigi la lingvon kaj nia klubon.

Sabaton, la 4-an de Oktobro okazis la ĝenerala jarkunsido de nia asocio kaj la regiona esperanto-tago.



Komenciĝis la amika tago kun la ĝenerala jarkunsido de nia asocio.

Post filmeto, per kiu salutis la ĉeestantaron Xavier Godivier, prezidanto de Espéranto-France, la partoprenantoj aprobis la agadraporton de la pasinta jaro, elektis - fakte reelektis - la estraron, decidis pri la 2025-2026-a agadplano kaj buĝeto. Post klarigoj de Raymonde Coquisart, estraranino de Espéranto-France, kiu respondecas pri la kongresoj-organizado, la klubo konsentis organizi la venontan kongreson de Espéranto-France. Ĝi do okazos en Normandio fine de Majo 2026.

Post tiu ĉi grava momento, disvolviĝis la regiona studtago laŭ la temo "Normandoj, indiĝenaj aŭ enmigrintaj, kiel ili kontribuis riĉigi Normandion?"

Unue prelegis Marc Pottier, historiisto, aŭtoro de la libro "Normands de tous pays" (Cahiers du Temps, 1999). Li rakontis, kiel la eksterlandaj laboristoj konstruis kaj funkciigis la grandan uzinon Société Métallurgique de Normandie de la komenco de la 20-a jarcento ĝis 1993 kaj substrekis la faktorojn, kiuj ebligis homojn el 36 naciecoj vivi kune kaj integriĝi en la tiaman francan socion.

Poste Bertrano prezentis sian serĉojn pri la Esperanto-Grupo de Mondeville. Ĝi estis fondita en 1936. Strange ĝi forvapiĝis kelkajn monatojn poste. Ĝi lasis preskaŭ neniun spuron. Nur kelkaj membroj estas konataj. Kial malaperis tiom rapide tiu sufiĉe granda grupo - ĝi konsistis el 95 klubanoj - ... mistera mistero, li konkludis.

Post amika tipe normanda manĝo, ni promenis tra la laborista urbo Plateau laŭ la spuroj lasitaj de la eksterlandaj komunumoj. La promenada prelego okazis dulingve, kun la helpo de eksaj laboristoj de la granda uzino, anoj de la asocio Mémoire et Patrimoine SMN. 35 homoj, esperantistoj aŭ ne, partoprenis en la evento. Ĝojiga estis la ĉeesto de kelkaj esperantistoj de la apudaj normandaj departementoj!



La 22-a kaj la 23-a de novembro okazis finsemajna duagrada kurso en La Garde, apud Tulono, gvidita de Yan-Petro Kavlan. 10 staĝintoj partoprenis en ĝi. Dum la staĝo estis laŭtvoĉe legita *La Kantanta Arbo*, la rakonto de Bernard Clavel, tradukita kaj eldonita de nia klubo.



“La libro multe plaĉis al la staĝintoj. Ĝi pedagogie perfekte taŭgas por lernado en dua grada kurso” mesaĝis la instruisto.

La raporto pri la staĝo oni legu [ĉi tie](#).

La libro estas aĉetebla en [nia libroservo](#).

Nova vizito de Claude Rouget.

Survoje hejmen al Tromsø, post studperiodo pri historio en Romo, vizitis nin denove nia franc-norvega amiko Claude Rouget. Mardon la 2-an de Decembro, li partoprenis en nia klubkunveno kaj prelegis pri interesa neatendita temo: Ĉu Donald Trump povus ricevi Nobel- premion pri paco en 2026? (vidu paĝo 4). Post la kunveno, ni kune manĝis en la rrestoracio Artoj- Kafejo (Café des Arts).

Kotizoj 2025-2066

Listo de la kotizintoj 2025-2026

Brunet V., Cagnard C., Charles V., Cottin B., Dalibert F., Danel K., Danel J., Dion C., Dufeu P., Duflot M., Ferrand C., Fortin F., Fortin J.-M., Hardel E., Langeois M., Lemarié S., Lemeltier M., Leprévost A.-M., Marlier-Riquier C., Plantade F., Rouget C., Sauvage J.-P., Sénécal Gé., Sénécal Gi., Tarlevé B., Troisgros R., Verstraete B., Verstraete V.

Vous ne trouvez pas votre nom dans la liste ?

Peut-être avez-vous oublié de régler votre cotisation. Il n'est pas trop tard !

Rendez-vous sur le site esperanto-france.org/adherer et adhérez soit en ligne soit en y téléchargeant le bulletin d'adhésion à retourner par voie postale.

Contactez nous en cas de difficulté (esperanto.herouville.14200@gmail.com)



Pas encore espérantiste ? Rejoignez-nous !

Nos cours se déroulent chaque mardi (hors vacances scolaires) de 17 heures 30 à 19 heures 00 à la Maison des Associations : 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair

Vous ne pouvez pas vous joindre à nous ? Inscrivez-vous au **cours en ligne gratuit I -Kurso**. Un **correcteur** vous sera attribué qui accompagnera votre progression au cours des **10 leçons** que vous suivrez à **votre rythme** jusqu'à recevoir votre attestation de formation.

Renseignements: esperanto.herouville.14200@gmail.com

☎: +336 09 42 10 06



lumaniero, la historio de la Nobel-premio pri paco komenciĝis en 1848, kiam **Ascanio Sobrero (1812-1888)**, itala kemiisto, malkovris en sia laboratorio de la universitato de Torino, nitro-gliceridon ($C_3H_5N_3O_9$). Li kontraŭstaris al la komerca uzado de la produkto, ĉar la eksplodoj estis tro danĝeraj.

Alfred Nobel (1833-1896) pluevoluigis la malkovron de Ascanio Sobrero, kreis dinamiton, kiu estas pli stabila kaj malpli danĝera produkto. Li registris la inventaĵon kaj pro ĝia komerca uzo riĉega, sed li ne fondis familion kaj mortis en 1890 en Sanremo, sen rektaj heredantoj.

Nobel estis inspirita de sia sekretariino kaj amikino **Bertha von Suttner (1843-1914)** aŭstra pacistino kaj verkistino, aŭtoro de *Die Waffen Nieder* (1889). La libro cetere estis eldonita en Esperanto en 1914 sub la titolo **For la Batalilojn!** Alfred Nobel kreis testamente kvin premiojn el rentumoj de sia kapitalo. Lia donaco estu dividita egale ĉiujare inter kvin apartaj kampoj: fiziko, kemio, medicino, literaturo kaj paco por rekompenci tiujn, kiuj dum la antaŭa jaro faris la plej grandan servon al la homaro. Nobel-premio pri ekonomio estis siaflanke kreita en 1969 de Sveda nacia banko honore al Alfred Nobel.

Alfred Nobel estis svedo. Li decidis, ke la Sveda akademio de sciencoj elektu le premiiton pri fiziko kaj ĥemio, la Carolinska institutet (medicina fakultato) en Stokholmo decidu tiun pri medicino, la Sveda akademio premiu la gajnanton de la premio pri literaturo. Elektas la premiiton de la pacpremio la *Storting*, la norvega parlamento. Nobel neniam klarigis kial li komisiis Norvegion prefere al Svedion. Oni povas tamen hipotezi. Oni devas unue memori, ke, dum la vivo de Nobel, Svedio kaj Norvegio, kvankam apartaj ŝtatoj havis komunan reĝon; pri la internaciaj rilatoj decidis sole la sveda registaro, Norvegio do ne havis propran ministron pri eksteraj aferoj. Eble pro tio Norvegio aperis pli neŭtrala lando.

Laŭ la testamento de Nobel, la komitato konsistas el 5 personoj elektitaj de norvega Parlamento. En la komenco, temis pri la norvega ĉefministro la ministro pri eksteraj aferoj, deputito, profesoro pri juro kaj la fama verkisto Bjørnstjerne Bjørnson. Depost 1936, neniuj membro de la registaro partoprenas en la komitato, kaj depost 1977, la komitato ne plu enhavas parlamentanon kaj ricevis novan nomon: norvega Nobel-komitato.

Ĉi-jare, la komitatanoj estas:

- Jørgen Watne-Frydnes (nask. 1984), elektita por 2021-2026, estras la komitaton ekde 2024. Li estas ĝenerala sekretario de la norvega sekcio de PEN International kaj estrarano de norvega sekcio de Helsingfors-komitato (pri homrajtoj).
- La vicestro de la komitato, elektita por 2024-2029, estas Asle Toje (nask. 1975). Li estas ŝtatscienculo, doktoriĝinta pri internaciaj rilatoj. Politike, li estas dekstrulo kaj proponita de FrP (populisma dekstra partio).
- Anne Enger (nask. 1949) elektita por 2021-2026 estis estrino de la Centra partio. Ŝi en 1994 estas fama pro tio, ke ŝi vigle batalis kontraŭ membriĝo de Norvegio al EU en 1994.
- Kristin Clemet (nask. 1957), elektita por 2021-2026, estis ministro pri edukado kaj nun estras la liberalan "pensfabrikon" Civita. Ŝi estas membro de la dekstra partio Høyre, tamen ŝi estas tre kritika al Donald Trump.
- Gry Larsen (nask. 1975) elektita por 2024-2029 estas eksa politikistino de la Laborista partio kaj nun estras grandan norvegan firmaon.

Ĉu la komitato povus premii Trump?

Certe iu ajn deputito ie ajn en la mondo rajtas proponi la kandidatecon de la usona prezidanto. Sed nur la kvin membroj de la Nobel-komitato decidos; neniuj aliaj havas influon, nek la Norvegio kaj nek la usona registaro.

En la hodiaŭaj cirkonstancoj, oni povas konjekti la sekvajn voĉdonojn. Frydnes? Plej verŝajne ne! Toje? Eble. Clemet? Ne! Enger? Dubinde! Larsen? Malverŝajne!

La nuntempaj ŝancoj, ke Trump ricevos la premion ŝajnas do hodiaŭ tre malaltaj.

Tamen, se li sukcesus ĉesigi la militon en Ukrainio en honora maniero, lia ŝanco gajni la pacpremion tamen estus konsiderenda. Sed ĉiaokaze, La debatoj inter komitatanoj estos sekretaj dum 50 jaroj.



La medalo de la Nobel-paco-premio



Subteninda peticio por ke Monto Vaalsberg estu renomita Monto Zamenhof.

Shabi Fiumei lanĉis peticion, por ke Monto Vaalsberg, ĉe la kvarpunkto kie renkontiĝas Belgion, Nederlandon kaj Germanion, apud la iama Amiĉejo, estu renomita Monto Zamenhof. Subtenu ĝin kaj subskribu sekvante [tiun ligilon](https://c.org/YzsFjhT5pV) (<https://c.org/YzsFjhT5pV>) aŭ skanu la apudan QR-kodon.

Vaalsberg, kun alteco de 322 metroj, estas la plej alta punkto en Nederlando. Ĝi ne estas nur geografiaĵo, sed ankaŭ simbolo de unueco, ĉar ĝi situas ĉe la kvarpunkto, kie la limoj de Amiĉejo (Neŭtrala-Moresneto), Belgio, Germanio kaj Nederlando renkontiĝas. Ĉi tiu loko havus unikan potencialon fariĝi lumturo de internacia harmonio kaj kultura graveco, se ĝi ricevus nomon Monto Zamenhof / Zamenhofberg / Mont Zamenhof, honore al Ludwik Lejzer Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto.




L.L. Zamenhof, pola-juda lingvisto, inventis Esperanton en 1887. Li celis kreskigi pacon kaj komprenon inter homoj de malsamaj lingvoj kaj kulturoj per komuna lingva komunikilo. Nomi Vaalsberg laŭ lia nomo ne nur omaĝus liajn viziajn idealojn, sed ankaŭ plifortigus la spiriton de tutmonda harmonio kaj kunlaboro. Tiu ĉi loko, ĉe la limo de 3 nacioj, estas perfekta emblemo de la unueco, kiun Zamenhof antaŭvidis per sia kreado de universala lingvo, kaj ĝi aktive kuraĝigus konscion kaj uzon de Esperanto tutmonde.

Renomi Vaalserberg al Monto Zamenhof ankaŭ kongruus kun historiaj precedencoj en la areo. La regiono iam estis hejmo de Amiĉejo, malgranda utopia enklavo en la antaŭa Neŭtrala Moresneto establita en 1908 de esperantistoj, kiuj fieris pri internacia amikeco kaj kunlaboro. Restaŭrante esperantistan ligon al ĉi tiu loko, ni reasertas nian engaĝiĝon al ĉi tiuj daŭraj principoj kaj plue subtenas la heredaĵon kaj antaŭenigon de Esperanto.

Ĉi tiu iniciato ne estas nur renomigo; ĝi estas paŝo al antaŭenigo de kultura inkluziveco, monda paco kaj la lingvo Esperanto kiel ilo por tutmonda kompreno. Adopti nomon, kiu enkarnigas la aspirojn de kompreno kaj solidareco translimaj, ankaŭ signas renoviĝintan engaĝiĝon por lingva kaj kultura diversecoj.

Aligŭ al ni en ĉi tiu klopodo honori la heredaĵon de L.L. Zamenhof, festi niajn komunajn homajn valorojn, kaj antaŭenigi Esperanton per renomo de la Vaalserberg al Monto Zamenhof. Via subteno estas decida por realigi ĉi tiun simolan ŝanĝon. Bonvolu subskribi ĉi tiun peticion por montri vian engaĝiĝon al pli unuiĝinta kaj harmonia mondo.





Editions Perrin - 10.2025 - 368 p.
27,00 € - version E-pub : 18,99 €
ISBN : 2262105987



Verkis
Bertrano el Ĵibervil'

L'auteur. Thomas Creusot qui sera présent au congrès d'Espéranto-France en mai prochain à Hérouville est conservateur à la Bibliothèque nationale de France. Formé à l'École des Chartes, il a soutenu en 2022 une thèse intitulée "L'utopie sous presse : éditer l'espéranto en France (1897-1939)" pour l'obtention du diplôme d'archiviste paléographe. La qualité de ce travail lui a valu de voir son travail publié aux éditions Perrin l'éditeur de référence pour les ouvrages historiques.

"Le badaud qui aurait déambulé, le samedi 5 août 1905, dans les rues de la ville basse de Boulogne-sur-Mer, serait sans doute resté quelque peu interdit devant les drapeaux déployés au-dessus du Grand Café, flottants aux fenêtres ou suspendus au-dessus des rues"...

La suite, nous la connaissons... bien moins pourtant que nous le croyons.

Comment s'explique le succès, somme toute improbable, de la langue internationale espéranto au début du siècle dernier, pourquoi cet élan va-t-il ensuite s'estomper, sans jamais pourtant mourir comme ce fut le cas pour les autres langues construites ?

C'est cette riche histoire que nous raconte Thomas Creusot au fil des 300 pages de son livre, explorant tous les ressorts qui firent le succès de l'espéranto en France au début du XXème siècle, dans le monde du tourisme et des affaires alors que le développement des technologies et des transports rendait chaque jour plus désirable et nécessaire l'utilisation d'une langue internationale, dans le monde scientifique ensuite, puis dans le monde ouvrier et dans celui de l'école, dans toutes les composantes de la société en somme. Thomas Creusot, en paléographe, explore les trésors de l'édition espérantiste, livres et périodiques, qui témoignent de la diffusion de la langue internationale, de son essor, des crises et des débats qui souvent traversèrent pourtant le mouvement. Dans la seconde partie de l'ouvrage il met en évidence et interroge les concepts, les projets, les valeurs parfois convergents, parfois divergents, explicites ou implicites, qui constituent cette utopie dont nous sommes encore porteurs. Legenda kaj leginda libro!

En iu malnova Normanda Esperanto-Bulteno proponis Henri Rousseau amuzan ludon. Oni verku tekston konforme al libere elektita sed strikta regulo. Ekzemple, li proponis verki tekston, kiu ne enhavu supersignitan literon. Alian defion mi trudis al mi. Mi verku mikronovelon, kiu enhavas **precize 100 vortojn**. Ne unu plian, ne unu malplian. Jen ekzemplo.

Se vi ankaŭ verkus tian laŭregulan tekston, sendu ĝin. Tiel eble povus nia bulteno proponi novan regulan rubrikon.

Frue enlitiĝis mi ĉi-vespere kaj tuj ekdormis.

Baldaŭ sonĝas mi:

Novembras. Ekaŭtunas.

Kvankam mi ne vidas iun ajn plukiston, kalviĝas la arboj.

Kvankam mi ne vidas iun ajn pentriston, flave, ruĝe, brune koloriĝas l' arbar'.

Kvankam mi ne vidas iun ajn flutiston, muzikas la bizo tra la branĉar'.

Kvankam mi ne vidas iun ajn akvumiston, surgrunde videblas flakoj.

Frue vekiĝis mi ĉi-matene kaj tuj ellitiĝis.

Mirigas min la velkintaj folioj surgrunde, la flava, ruĝa, bruna koloroj de l' arbar', la muziko de la bizo tra la branĉar'.

Elirante la domon, en flakon mi paŝas.

Do... ne estas sonĝo!

Novembras. Ekaŭtunas.



Verkis
Bertrano el Ĵibervil'



1000 jaroj pasis de la fondiĝo de la urbo, ĉu ne estas bona okazo por rakonti la ĉefajn eventojn de ĝia historio? La unuajn epizodojn ni rakontis en la 292-a bulteno. Jen la sekvo.

1432. La angloj revenis en 1417. Henriko la 5-a alboriĝis ĉe Touques. Ĉi-foje li celis konkeri Normandion per kaptado de ties ĉefaj urboj. Li ĉirkaŭis Kaeno-n, kiu kapitulacis la 19-an de septembro. La reĝo ekloĝis tie kaj plurfoje restadis en la urbo inter du bataloj en 1417 kaj 1418.

Li rekonstruigis la preĝejojn, kaj plifortigis la kastelon per barbakanoj sur la pordegoj Saint-Pierre kaj des Champs.

En la komenco, li traktis severe la loĝantaron, sed poste provis gajni la simpatian de la kaenanoj. Li restarigis la municipajn liberecojn de la urbo en 1421.

En 1432, Johano de Lancaster, regento de Anglio kaj ankaŭ do de la anglaj posedaĵoj en Francio dum la neplenaĝo de Henriko la 6-a de Anglio, fondis la Universitaton de Kaeno por instrui la estontajn anglajn elitojn por faciligi la administradon de la anglaj posedaĵoj en Francio..



1562. Ekde la 1530-aj jaroj, Kaeno estis trafita de la tumultoj de la Religiaj Militoj. Protestantoj ĉiam pli multnombriĝis. En 1558, du el la estroj de la universitato fondis protestantan paroĥon.

En 1561, kvankam la protestantoj estis rajtigataj celebri diservojn ekster la urbomuroj, ili daŭre restis ene de ili. Ili prenis la kontrolon de la urbo en 1562, profanante la tombojn de Vilhelmo la Konkerinto kaj de Reĝino Matilda. Ili poste malrajtigis la katolikajn servojn. Alveninte en Kaeno en decembro 1562, la gvidanto de la hugenota partio, Admiralo de Coligny, ordonis detrui la abatejojn: ĝia ĉartejo estis bruligita, la trezoro rabita kaj la abatejo ruinigita.

1793. Komence de la Revolucio, manĝaĵmalabundo kaŭzis manifestaciojn. Loĝantoj kolektiĝis por kontraŭstari la foriron de grenkonvojoj. Ili estis subpremitaj far la Burbona Regimento, kazernigita en la kvartalo Vaucelles. La 12-an de Aŭgusto, la kazerno estis atakita de homamaso, kiu konfiskis la armilojn konservitajn en la kastelo, kiun ili okupis ekde la 21-an de Julio. Por eviti konflikton, Henri de Belzunce, oficiro konata pro siaj kontraŭrevoluciaj sentoj, iris al la kastelo. Forlasante la kastelon, li estis masakrita kaj dismembrita de la revoluciuloj.

La urbo tamen ne subtenis la Teroron. En 1793, la kaena sekcio de la Jakobena Klubo rompis siajn ligojn kun la parizan. Senluziigita de la malforteco de federaciisma reago en Normandio, Charlotte Corday mortigis Marat en Parizo. Reprezalie, la nacia konvencio ordonis la detruon de la Kastelo de Kaeno. Fakte, nur la turo kaj la pordego Sankta-Petro estis difektitaj.



1857. François-Gabriel Bertrand, kromnomita la "Hausmann de Caen" estris la urbon de 1848 ĝis 1870. Li modernigis kaj transformis Kaenon, establis kompletan akvodistribuan reton, kompletigitan en 1857, kaj konstruigis la fervojan stacidomon, kiu estis inaŭgurita la sekvan jaron. Li kovrigis la riveron Petite Orne kaj parton de la rivero Odon. Li inaŭguris la Kanalon Kaeno-al-Marco en 1857 kaj partoprenis en la evoluigo de la haveno de Kaeno.

1917. Antaŭ la komenco de la Unua Mondmilito, la urbo kaj ĝiaj apudaj urbetoj spertis novan turnopunkton. Vera "fortikaĵo de laboristoj", la "fajra uzino" Société Métallurgique de Normandie (SMN) fariĝis flagŝipo de la loka industrio. Ĝi funkciis ĝis 1993. Hodiaŭ nur ankoraŭ videblas la ikonon malvarmigilon, kiu atestas de la industria pasinteco de la regiono.

La kanalo tiam fariĝis grava transportvojo. Per ĝi, oni transportis karbon, ferercon, samkiel agrikulturajn kaj industriajn produktojn. Tiel Kaeno daŭrigis sian ekonomian disvolviĝon kaj altiris laboristan loĝantaron. Ekde 1920, komenciĝis laboro por modernigi kaj plibonigi la urbajn spacojn.



1944. Deklarita "malferma urbo", Kaeno estis konkerita de la germanoj sen batalo en 1940 kaj okupita ĝis 1944. La 6-an de Junio, la Aliancanoj ne sukcesis reakiri Kaeno-n en la tago de la D-tago. Dum pli ol monato, ili intense bombadis la regionon por neŭtraligi la germanajn defendojn kaj la strategiajn lokojn, celante la havenon, la fervojan stacidomon kaj la pontojn. Incendioj detruis la historiajn kvartalojn: Placon de la République, Universitaton, Kastelon, ktp., mortigante pli ol 2 000 civilulojn.

Ekde 1946, la urbo estis rekonstruita laŭ la decidoj faritaj antaŭ la milito: pli vasta spaco, kun larĝaj avenuoj, vastaj kaj helaj apartamentoj, serĉado de ekvilibro inter naturaj spacoj (la Herbejo, la rivero Orne) kaj la konservado de la antikva heredaĵo.



1968. Tiam Hérouville Saint-Clair estis ankoraŭ malgranda antaŭurbo de Kaeno. Neniu povus imagis, ke ĝi baldaŭ fariĝos la dua plej granda urbo de la departemento Calvados. La kreskiĝo de la loĝbezonoj post la Dua Mondmilito instigis la tiamajn aŭtoritatojn al la konstruado de novurbo. Ili volis ĝin, ne nur dormurbo, kaj imagis ĝin agrabla, verda kaj interkultura.

Inter la jaroj 1968 kaj 1975, novaj kvartaloj estis konstruitaj, kiuj altiris familiojn el la tuta regiono. Hérouville Saint-Clair rapide fariĝis eksperimentejo. La "Big Band Café", malfermita en la 1980-aj jaroj, konatigis la urbon en la mondo de moderna muziko. Poste venis la "Festival de Beauregard", kiu ĉiun someron altiras milojn da spektantoj, el Francio kaj el aliaj landoj. Ankaŭ disponigas la urbo al siaj loĝantoj riĉan socian kaj asocian vivon: novaj lernejoj, bibliotekoj kaj sportejoj kreskis inter la arboj kaj lagoj. Hérouville Saint-Clair fariĝis simbolo de diverseco kaj kunvivado kun siaj loĝantoj el pli ol cent nacioj.



2025. Rueno, la sidejo de la regiona prefektejo, estas la administra ĉefurbo ekde la reunuiĝo de Normandio en Januaro 2016, la Regiona Konsilio havas sian ĉefsideon ĉe la Abatejo de Damoj en Kaeno, ĝia politika ĉefurbo.

Ĉirkaŭ ĝi, 47 aliaj municipoj kuniĝis por konsistigi la Urban Komunumon Caen-la-Mer, kies loĝantaro konsistas el ĉirkaŭ 275 000 homoj, inkluzive de preskaŭ 35 000 studentoj, kiuj ĉeestas la universitaton kaj la 70 altlernejojn, dum ĝi bonvenigas preskaŭ 7 000 000 turistojn ĉiujare.


Fermiĝis la festoj de la jarmilo de Kaeno la 21-an de decembro.

Mirindaj artfajraĵoj, la mondfama kaena repisto Orelsan kiel stelgasto por tri kanzonoj kantitaj sur platformo pendanta en la ĉielo antaŭ 40 000 spektantoj amasitaj sur la esplanado de la urbodomo, jen la grandioza finalo de la Jarmilo-festoj de Kaeno.

Ĝis revido en... 3025!

**21
DEC**

La version d'essai de la future édition du PIV est désormais accessible gratuitement en ligne à l'adresse <https://testo.vortaro.net/>.



Laŭ artikolo eldonita de
Liberafolio.org,
verkis Bertrano

Qu'est-ce qui change ?

L'accès en ligne privilégié.

Même s'il n'est pas exclu qu'une version papier soit ultérieurement publiée, l'équipe qui, autour de Bertilo Wernnergren, travaille depuis plus de cinq ans à l'actualisation du dictionnaire de référence de l'espéranto a choisi de privilégier l'accès en ligne, ce qui permettra de le compléter et de le mettre à jour de façon continue et réactive.

Une présentation beaucoup plus claire.

Chaque article est désormais présenté de manière beaucoup plus claire, en plusieurs paragraphes répartis en sections (et non plus comme un seul bloc de texte). Les exemples sont présentés sous forme de liste sur une ligne distincte. À chaque radical est associé un indicateur de fréquence.

Une analyse plus juste de la composition des mots.

L'analyse de la composition de nombreux mots, erronée dans les éditions précédentes, a été corrigée et organisée de façon cohérente.

Ainsi, le mot "nemaltrafebla" présenté dans le PIV 2020 sous la forme "nemal.traf.ebla" s'analyse désormais bien plus logiquement "ne.mal.traf.ebl.a".

Les entrées ont été rationalisées. Si l'édition 2020 enregistrait bien par exemple, "nep.o", et son féminin et "nep.ino", il omettait "pranepino" quand il admettait "pra.nep.o".

Des exemples plus nombreux et rigoureusement sourcés. Des illustrations à enrichir.

Toutes les citations d'auteur données à titre d'exemple ont été vérifiées et corrigées, assorties d'un lien qui renvoie chacune d'entre elles au site tekstaro.com où elle apparaît dans son contexte d'origine.

Un grand nombre d'exemples ont été ajoutés et référencés.

Le thésaurus admet aujourd'hui 650 auteurs, quand il n'étaient que 53 dans l'édition de 2020.

Les illustrations sont encore rares mais seront ajoutées au fur et à mesure.

Et Zamenhof ?

Son nom n'était pas dans l'édition 2020 du PIV. Il y fait son entrée... C'est la moindre des choses !

Et ensuite ?

Cette version n'est qu'une préfiguration de la nouvelle édition, encore en cours d'élaboration. Même si elle est d'ores et déjà très riche, elle n'est pas encore finalisée. Un bouton permet de revenir d'un clic à la version officielle, PIV 2020.

Pour le reste, attendons. Aucune date n'est fixée pour que la nouvelle version lui succède officiellement. Bertilo Wernnergren et son équipe aiment plaisanter en parlant du PIV... 2030!

Oni ofte taksas  **DeepL** kiel la plej bonan tradukilon en la tuta interreto. Estas vere, ke eĉ profesiaj tradukistoj uzas ĝin.

Dum Guglo aldonis Esperanton de post 2012, DeepL ĝis nun ne scipovis la internacian lingvon. La situacio ŝanĝiĝis, kiam, la 3-an de novembro, estis aldonitaj 79 lingvoj, inkluzive de Esperanto. 114 lingvoj nun disponeblas en la programaro, kiu tamen ne konas la normandan!

Notu, ke Esperanto estas la ununura artefarita lingvo registrita.

La senpaga versio ebligas la tradukon de 50.000 karakteroj monate. La Guglo-tradukilon siaflanke estas tute senpaga sen kvantolimo kaj disponeblas en 243 lingvoj. Ambaŭ povas esti utilaj lingvohelpiloj sed foje proponas stultaĵojn... Fine, tio estas ja bona novaĵo: komputilo kaj artefarita inteligento ne sukcesos tute anstataŭi vin, kvankam ili povas helpi.



La Bona Lingvo

La retejo  **Bona Lingvo** celas proponi al vi pli bonajn, simplajn, samsignifajn vortojn por anstataŭi malutilajn novajn radikojn aŭ nacilingvajn enportojn, kiam ekzistas alternativoj pli belaj, klaraj, kaj pli facile kompreneblaj de eksterlandanoj tra la tuta mondo.

Ekzemple, la retejo konsilas uzi “aĵo” prefere al “afero”, “sentokompreno” prefere al “empatio”, “maldestre” prefere al “live”, “rekantaĵo” prefere al “refreno”, ktp...



Fondita en julio 2025 de la hungara verkistino Erika Godó, kiu estras ĝin kun John Huang, la revuo  **Literatura vivo** estas ĉiumonata revuo, kiu celas montri al literaturŝatantoj la riĉecon de la esperanta literaturo per diversaj ĝenroj kaj voĉoj: poemoj, prozo, kantotekstoj, tradukoj, intervjuoj de verkistoj, ktp....

Ĉiu revuo enhavas ĉirkaŭ 140 paĝojn kaj estas libere kaj **senpage elŝutebla** laŭ la pdf-formato.

Tiuj, kiuj ŝatas verki aŭ traduki povas sendi siajn skribaĵojn al la redakcio por ke ili estu eldonitaj kaj dividitaj kun la legantaro.

Vi eĉ, ĝis la 31-a de marto 2026 povas partopreni en la unua **Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay** kies gajnintoj estos anoncigitaj la 1-a de Aŭgusto 2026.

Ofte ekzistas en Esperanto pluraj manieroj por esprimi sin inter kiuj, oni povas heziti.

Ekzemple, ĉu diri *la franca* aŭ *Franca lingvo*, ĉu elekti *Francujo* aŭ *Francio*, ĉu uzi la vorton *komputilo* aŭ la vorton *komputoro*, ĉu *far* aŭ *fare de*, ĉu *negoci* aŭ *trakti aferojn*, ktp.

En revuo kiel **Monato**, la redakcio kompreneble atentigas, ke la karaktero de la revuo estu unueca. Tial, ĝi **listigas konvenciojn**. Temas fakte pri **valora helpilo kaj modelo por ĉiuj, kiuj hezitas** pri la plej ĝusta elekto.

La kovritaj kampoj estas multaj: ortografio de **ŝtatonomoj**, **organizaĵoj** kaj **sigloj**, ortografio de la **propraj nomoj** inkluzive de tiuj originale skribitaj per aliaj alfabetoj (ĉina, japana, rusa, ...), transskribo de **nombroj**, **datoj**, **tempo** kaj **daŭro**, uzmaniero de **interpunkcio** (inkluzive uzmaniero de **komoj** kaj **spacetoj**), prezento de la **citaĵoj**. Ankaŭ la listo proponas **leksikajn konvenciojn** kaj listigas kelkajn **oftajn erarojn** kaj **novajn uzindajn vortojn**.

 **Monato-konvencioj:** <https://www.monato.be/konvencioj.php>





De la 14-a ĝis la 21-a de Marto okazos en Les Issambres (83) la Mediteranea Esperanto-Samajno

Temas pri unu samajno da Esperanto-kursoj en agrabla printempa etoso, en la bela hotelo *Miléades*, iama palaco el la 1930-aj jaroj, en 3-hektara parko, kun rekta aliro al la plaĝo.

Matenoj estos organizitaj kursoj laŭ 3 niveloj.

- Kurso 1 - komencparolantoj kaj komencintoj - instruos Katalin KOVATS (Nederlando - Hungario)
- Kurso 2 - paroliga-kleriga kurso pri Esperanto-Literaturo - instruos Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Nederlando - Pollando)
- Kurso 3 - paroliga-kleriga kurso pri mikronoveloj - instruos Maurizio GIACOMETTO (Britio - Italio)

Posttagmeze, vi povos ĝui liberan tempon por viziti la apudajn turismajn urboj aŭ ĝui la apudan bankuracadon. Vespere estos proponita distra programo.

Vi jam povas aliĝi [rete](#) aŭ plenumante kaj sendante la [paperan aliĝilon](#).

Jam estas tempo aliĝi al la aprilaj eventoj organizitaj en la Esperanto-kulturdomo.



La studperiodo "Printempas" okazos de la 17-a ĝis la 26-a de aprilo 2026.

Ĝi inkluzivos Esperanto-kursojn en kvar niveloj, ekzamenojn, distran-edukan programon kaj ekskursetojn. La kursojn gvidos niaj spertaj instruistoj: Marion Quenut el Tuluzo, Kóródy Zsófia kaj Birke Dockhorn el Germanujo, Pawel Fischer-Kotowski el Nederlando.

Pli da informoj kaj aliĝilo [ĉi-tie](#).

La Multaktivec-tagoj okazos de la 26-a de aprilo ĝis la 2a de majo 2026.

Ili inkluzivos biciklajn promenojn kun BEMI (Eddy van den Bosch), ĥoran kantadon kun Interkant (Bernard Bigonnet), praktikadon de Esperanto kaj Biblio kun Benoît Ente kaj pliajn programerojn.

Pli da informoj kaj aliĝilo [ĉi-tie](#).

UK 2026 okazos en Graz, Aŭstrio.

Kutime, la kongresurbon de la venonta kongreso oni anoncas 2 jarojn antaŭe. Multe malfrue la elekto de la urbo, kie okazos la 111-a Universala Kongreso. Tre malfrue, la 29-an de Junio la estraro de UEA finfine decidis kaj sciigis, ke la UK en 2026 okazos en Graz, la dua plej granda urbo de Aŭstrio de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2026. Jam oni povas aliĝi per [tiu ligilo](#).

42-paĝa gvidilo en Esperanto pri la urbo estas senpage elŝutebla [ĉi-tie](#): https://cutt.ly/Gvidilo_Pri_Graz. Surpapera versio de ĝi disponeblas en nia biblioteko.



Alklaku la bildon por aliĝi.

92-A
ITALA KONGRESO
DE ESPERANTO



La 92-a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Vico del Gargano de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2026 kaj la temo estos "Esperanto: lingvo de paco kaj de defendo de identecoj".

Vi povas ekde nun oficiale aliĝi!

En la kadro de la mirinda regiono Apulio, kun ĝia brila maro, vi ĝuos semajnon da kulturo, amuziĝo kaj spektakloj.

Aliĝu antaŭ la 31-a de januaro ĉe kongreso.esperanto.it por profiti la rabatitan kotizon!

Ĉu vi imagus Kristnaskon sen jularbo?

Ĉu natura, pleniganta la ĉambron per agrabla rezinodoro, aŭ artefarita; ĉu alta aŭ malalta; verda aŭ blanka; ornamita, ĉu per ornamaĵoj aŭ per elektraĵ lampoj, kandeloj, dolĉaĵoj aŭ donacoj, ĉu vi iam demandis vin, kial tiu ĉi specifa arbo, ne alia, estis elektita kiel kristarbo?

Kiam ĝi staras fiere en la mezo de la ĉambro, ornamita de la supro ĝis la piedo per steloj, brilaĵoj kaj lumoj, ĝi aspektas tiel majesta, ke malfacilas diveni fakte, ke la plej modesta el ĉiuj arboj fariĝis la reĝo de la finjaraj festoj. Ĝuste pro sia modesteco ĝi estis elektita por alporti la ĝojon de Kristnasko al junuloj tiel kiel al maljunuloj. Jen la rakonto.

Kiam la infano Jesuo naskiĝis, estis laŭdire granda ekscito en la tuta mondo. Ĉiuj vivantaj estaĵoj ĝojegis. Venis ĉiutage homoj de ĉie por vidi la bebon kaj alporti al li modestajn donacojn. Proksime al la stalo, kie li naskiĝis, staris tri arboj: palmo, olivarbo kaj abio. Tiom da homoj pasis sub iliaj branĉoj, ke ankaŭ ili baldaŭ ekdeziris donaci ion al la infano.

— Mi prenos mian plej grandan palmfolion, diris la palmo, kaj metos ĝin apud la kripo por milde ventumi la bebon.

— Mi prenos miajn olivojn por ŝmiri liajn piedetojn per mia propra oleo, rebatis la olivarbo.

— Kion mi povas doni al la infano? humile demandis la abio.

— Vi? mokis la aliaj du. Verdire vi havas nenion por donaci. Viaj akraj pingloj pikus la infanon, kaj viaj larmoj estas plenaj de rezino; ili odoras kaj gluas tro forte.

La kompatinda abio sentis sin tre malfeliĉa, kaj ĝi diris malĝoje:

— Vi pravas. Mi havas nenion sufiĉe bonan por donaci al la infano.

Anĝelo, staranta proksime, aŭdis la plendon. Li kompatis la abion, tiel humilan kaj bonfareman, kaj decidis helpi al ĝi.

En la ĉielo, unu post la alia, la steloj ekbrilis sub la ĉiela volbo. La anĝelo vokis ilin kaj petis kelkajn malsupreniri kaj sidiĝi sur la branĉojn de la abio. Ili faris tion volonte, kaj baldaŭ baniĝis la arbo en lumo. De la staltrogo kie li kuŝis, la belega arbo estis videbla de la bebo Jesuo, kaj liaj okuloj brilis hele vidante la belajn lumojn. Jubilis la abio.

Multajn jarojn poste, homoj, kiuj ne aŭdis pri ĉi tiu rakonto, alprenis la kutimon lumigi abion en ĉiu domo dum kristnaska vespero, ornamitan per flamantaj kandeloj, ĝuste kiel tiu, kiu brilis antaŭ la kripo.

Tiel la abio estis rekompencita pro sia humileco. Certe ne ekzistas alia arbo, kiu heligas tiom da feliĉaj vizaĝoj!